TEA-BULTENO

14ª JARO | SEPTEMBRO - OKTOBRO 2011 | NUMEROJ 9-10

La limoj de mia lingvo estas la limoj de mia mondo.
Ludwig Wittgenstein (aŭstra filozofo - 1889-1951)

Karaj Tea-anoj kaj kara legantaro! Iom nekutiman malfermartikolon ĉi foje via redaktoro prezentas! Eble suno tro brulradia, en ĉi somera periodo, frapis ŝian kapon, kaj igis ŝin *Grampàmpel*-o! Ĉu vi ne komprenas? Tuj solvita la problemo: legu la suban skribitaĵon kaj ĉio fariĝos klara. Intertempe Triesta E-Asocio malfermis ĉiujn siajn pordojn kaj atendas vin por eki eksterordinaran agadon favore al Esperanto. Projektoj abundas, laboro ne mankos, kaj ĉio bone sukcesos, se ni ĉiuj kune laboros! **Elda**

Tipe triesta

Kiel transformi aŭtentikan *Pàmpel** al *Granpàmpel***

Varmigu en granda kaldrono la vinon kaj en ĝin metu botelon (ŝtopitan) da rumo. Prenu kribrilon kun tenilo (*criel col manigo*)[1] kaj en ĝin versŭ sukeron. Kiam vino kaj rumo varmas (ne devas boli!), surversŭ la sukeron per la rumo kaj la tuton fajrigu. Sekve miksu tiun fajraĵon kun la varma vino kaj, iom poste, "sufoku" la brulantaĵon, alie la trinkaĵo iĝos tro senalkohola. Aldonu kariofilojn, trunkŝeletojn de cinamo kaj buterpecon. Konsilindas aldoni pecetojn da pomo aŭ oranĝo, laŭ sezono aŭ prefero. Ĝin servu varmega!

Jes, temas pri *Grampàmpel* aŭ, laŭ aliaj interpretoj, *Gran Pàmpel*, t.e. tre renoma trinkaĵo (pli bone nomi ĝin 'drinkaĵo'!) tra tuta Triesto, kiu tamen riceveblas nur dum apartaj kunvenoj, renkontiĝoj, festoj k.s. Ĝi disvastiĝis ĉefe inter speleologoj (grotesplorantoj) aŭ rok-grimpantoj, kiuj emas al *licof* [2] altgrad-alkohola. La tutan preparadon oni kutime akompanas per kanzon(aĉ)oj, kriadoj kaj similaj bruaĵoj: ĉio ĉi, memkomprenebleble, eĉ pli varmigas la jam sufiĉe varman etoson!

Ŝajne hodiaŭ ĝi ne estas tiom populara, kvankam ankoraŭ sufiĉe aprecata de junuloj, kiujn allogas bruaj festenoj subĉielaj, aŭ de vizitantoj de *osmize*[3], sed tute ne de diskotek-emuloj.
Sed estus interese ekscii, de kie venas tiu termino *pàmpel*, ĉu ne? *Pàmpel* aŭ *pàmpele* plimalpli signifas stultulon, malspritulon, senkapulon. Plej probable ĝi devenas el latina lingvo, el termino *Pampinum*, itale *pampino*, kio estas la tordiĝanta vitŝoso. Tiu vitŝoso elvokas etan aĵon, neniaĵon, eble eĉ infanon, kies cerbo estas ne entute evoluinta.

Tamen indas esplori pri la asonanco de *pàmpel* kun la termina radiko *bamb-*, el kiu formiĝas multaj vortoj, inter kiuj *bambino* (infano), sed triestadialekte ni trovas *imbambinì* (stultuliĝinta) kaj *bambàr* (misparoladi), kio indikas tiun fuŝparolon, balbutadon, tipan parolmanieron de iu nekapabla ankoraŭ bone sin esprimi, aŭ iu entute menskadukiĝinta. Tio dirite (ĉu vere ĉu malvere...), ni povas aserti, ke *pàmpel* havas nenion ajn komunan kun *Granpàmpel*, ĉar - plej probable - la trinkaĵo ricevis sian nomon el *Krambàmbuli* kiu nenio alia estas ol distilaĵo ruĝ-kolora, iam produktita en Dancigo. Ĝi estis la bazo por diversaj samspecaj produktaĵoj, kiuj plurloke en nord-Eŭropo alprenas similan nomon: en la nord-italia regiono *Trentino* ĝi ricevas la nomon de *Carambàmboi* (elp. Karambàmboi), dum en Triesto, kiel jam dirite, *Grampàmpel*, kaj eble tio veras, ĉar, post eltrinko de duono aŭ pli da litro, iĝi efektive 'Granda stultulo' estas la plej facila afero de ĉi mondo.



Tamen almenaŭ unu fojon en propra vivo indas gustumi tiun eliksiron. Antaŭ kelkaj jaroj, ankaŭ la anoj de Triesta Esperanto-Asocio deziris provi tiun valoran, eĉ, onidire, medikamentan, dekoktaĵon kaj speleologa amiko de loka esperantistaro ĝin pretigis en la asocia kuirejo: mi devas konfesi al vi, ke ĝi vere bongustis kaj post abunda trinkado ĉies langoj malligiĝis, kaj en la esperantaj ejoj dancis svarme nur fluaj, fluegaj elparoladoj en nia kara lingvo!
Kaj por fini, jen dozoj kaj ingrediencoj por prepari mem la dian likvoron: la recepto simplas, nur zorge oni devas sekvi la instrukciojn kaj precipe trovi amikojn kiuj ŝatas eksperimenti ion novan!

Por pretigi 5 litrojn da *Grampàmpel*:
4 litroj da blanka vino
1 litro da rumo (tiu por dolĉaĵoj)
1 kg da pomoj aŭ oranĝoj (laŭsezone)
1 kg da sukero
50 g da butero
Cinamo kaj kariofiloj k.b.

Gravas ke la rum-botelo ne estu entute mergita en la vino: la kolo devas eksterstari. Laŭ la nombro da drinkemuloj oni kalkulu la kvanton de la ingrediencoj. Kantu gaje kaj brue dum la farado kaj fine kune tostu je ĉies sano!

* *Pàmpel* - nomo de tre neordinara alkohol-trinkaĵo.
** *Granpàmpel* aŭ *Grampàmpel* = Granda *Pàmpel*
[1] - triestadialekte, elp. *Krièl kol manigo.*
[2] - elp. *likof*; origine signifis kuntrinkadon de masonistoj por festi la tegmentadon de domo en finkonstrua fazo. Ĝenerale temas pri kuntrinkado ĝis ĉies ebriiĝo.
[3] - elp. *Ozmìce* - portempaj vinvendejoj, starigitaj kele aŭ korte de vinproduktantoj havantaj sian bienon en la triesta karsto.


Internacia Esperanto-Konferenco en Wuhan - Ĉinio - aprile 2011

Mirformaj Poemoj en la Ĉina Poezio

Memoroj ŝvebas leĝere kaj revivigas la mirindajn momentojn, pasigitajn dum vojaĝado tra la Lando, okuloj ankoraŭ plenas je nepriskribeblaj pejzaĝoj, oreloj rave reaŭdas sonojn nekutimajn, muzikaĵojn fajnajn, menso - daŭre kribranta la intensajn impresojn - klopodas stoki ilin ĉiujn en taŭgajn memorujojn, dum la koro strebas trovi en si mem taŭgan spacon por tie konservi porĉiame la nomojn de tiom da malforgesindaj homoj. Granda ĥaoso regas en mia mikrouniverso, eble iam mi sukcesos ĉion ordigi, sed entute tio ne urĝas, ĉar daŭre mi ĝuas image tion, kio neatendite, de temp' al tempo, reaperas en la menso, koro, oreloj, antaŭ la okuloj.

Io aparte min surprizis dum IEK, aprile 2011, en urbo Wuhan, io kion eĉ ne tempopaso elvisos, t.e. la persona konatiĝo kun s-ro **Hu Guozhu**. Ĉarma viro, mirige ĝentila, aspekte delikata kaj tre modesta. Sed tuj senteblas, preskaŭ senseblas, ke li imponas, tre imponas per ia interna forto, per arda energio, per granda fervoro.

Naskita en Wuhan, li memlernis Esperanton en 1956 kaj ekde tiam tre vigle agadas, movade, verke kaj traduke. Li estis kunlaboranto ekde 1959 de "El Popola Ĉinio", redaktoro de "Penseo", beletra ĉina revueto, kiu publikigas originalajn verkojn en Esperanto kaj tradukojn el la ĉina (vd. www.elerno.cn/penlisto.htm), honora komitatano de Ĉina Esperanto-Ligo, membro de Akademio Literatura de Esperanto k.a. Do, entute grava eminentulo, kiun mi kuraĝis aliri ĝuste pro lia afablega konduto al ĉiuj ĉeestantoj. Ne ankoraŭ plene konsciante pri liaj altmeritaj kvalitoj kiel verkisto kaj tradukisto, mi estis mirigita ankaŭ de aliaj liaj ecoj, kaj precipe de lia senlima amo al Esperanto. Post ioma interparolado, li montris al mi libron: neniam ajn en mia vivo ion similan mi vidis! Ĉu ŝajnas al vi stranga ĉi aserto? Pro kio tiom speciala estis tiu libro? Temis pri la unua eldono de "Esperanta Antologio Poemoj 1887-1957", 640-paĝa volumo, kiun Hu Guozhu mankopiis, ekde titolo ĝis la lasta paĝo, inkluzive de Zamenhofa portreto!!! Se mi ne estus tion vidinta propraokule, eble mi ne estus kredinta! Sed ne nur tiun li estis kopiinta mane, pli ol dek aliajn librojn per plumo li skribis kaj kompreneble konservas, ankoraŭ nun, ĵaluze kaj ameme. Kiom da amo al Esperanto li surverŝis sur tiujn paĝojn, per klara, pura, eleganta kaligrafio, kaj tiun amon oni tuj eksentas lin alparolante. Kaj la kialo de tiu skribado? Ĉu eble ia ekzercado pri belskribado? Ne, tute ne! Kiel sciate, ĉinoj tute ne havis la eblecon aĉeti librojn aŭ revuojn eldonatajn ekster Ĉinio, precipe en la plej malfacilaj jaroj, tial li pruntis ĉe Esperanto-asocio la librojn kaj diligente ilin kopiis manskribe (ja, ankaŭ trovi kopimaŝinon en tiuj tempoj estis komplika afero). Eksterordinara homo, eksterordinara verkisto, eksterordinara tradukisto. Post tri jaroj de lia eklerno de Esperanto (1959), en "El Popola Ĉinio" aperis lia unua traduko de ĉinaj popolrakontoj. Kaj de tiam lia agado traduka kaj verka pli kaj pli ampleksiĝis: kiel ne haltigebla torento li versis verŝe, inunde.




Kovrilo de Esperanta Antologio, el ŝtofo, kun brodita titolo

Sed ni revenu al IEK: Hu Guozhu kontribuis al programo de la Konferenco per brila prelego pri 'Ĉina saĝo iom el han-lingvo - mirformaj poemoj', kiu, fakte, mirigis la tutan ĉeestantaron per sia atentokapta enhavo. Li, lerta ĵonglisto en beletra arto, prezentis ĝin tiel simple, tiel klare, tiel ĉarme kaj rave, ke ekestis – mi kredas en ĉiu el la aŭskultantoj – la deziro kaj emo tuj mem eksperimenti la diversajn versteblecojn. Mi provos al vi prezenti ĝin.

Verki poeziaĵojn oni povas diversmaniere, tio dependas de oniaj kulturo, klero, inspiro kaj fantazio. Poemo povas ricevi rimojn aŭ ne, *(certe vi, karaj legantoj, scias pli ol mi, kiel tio funkcias)*; rim-eblecoj estas senfinaj, dependas de versfaranto, ĉu ili estu agordaj, asonancaj, ĉu kontinuaj, ĉu alternaj, ktp. Sed mi ne invadu kampon pri kiu tute malkompetentas, nur simple montru la diversajn formojn de poemoj klarigitajn de Hu Guozhu.


Li komencis per priskribo de "Pagoda Poemo", laŭ kies karakterizaĵo, ene de triangulo, enestas poeziaĵo, konsistanta el unu silabo sur unua linio, du silaboj sur dua linio, tri silaboj sur tria, kaj tiel plu sinsekve. Tiu poemo povas fariĝi eĉ pli komplika, kiam temas pri "Inversa Poemo", nome du tri-anguloj, tranĉitaj meze per linio reprezentanta la "akvon": supre triangulo, t.e. la poemo Pagoda, kaj malsupre, sub la "akva" linio, daŭrigo de tiu poemo, tamen inverse, kvazaŭ se la unuaj versaĵoj reflektiĝus en la malsupra triangulo.

Ni vidu ekzemplon unue pri "Pagoda Poemo", ne verkita de



Baghy versis pagode

ĉino, sed de Julio Baghy, kiel asertis Hu Guozhu, mirigante ĉiujn: legeblas tiel unualinie, unusilaba vorto; dualinie, dusilaba, trialinie, tri-silaba ktp, dum "Inversa Poemo" tiel aspektas: klopodu mem enmeti en ĝin viajn versaĵojn.



Poste li prezentis, per kortuŝa ekzemplo, verkaĵon de li faritan honore al Magdalena de Zilah: temis pri 'Akrostika Rimgratulo', en kiu la unua litero de ĉiu verso estas la litero de ŝia persona nomo. Akrostiko estas poemo, kies komenca, meza aŭ fina literoj, legitaj vertikale, formas nomon, aŭ devizon aŭ ideon.

Daŭrigo je paĝo 3ª

Magdalena plej kara
Al mi kvazaŭ najbara
Gouzhu gratulas kore
De Ĉinio transmara
Al vi pro
La rara
Event' ordinara
Nasktagon ĝojan per la
Akrostiko mem fara!

Nekredeble lerte li muldas vortojn, elformante signifajn kaj elvokivajn poemojn, sed eĉ pli malfacilajn konstruaĵojn li kapablas elfari, kunmetante la diversajn specifaĵojn de ĉina versfarado! Jen kio el liaj plumo kaj koro eliĝis, dediĉe al IEK: Pagoda-Inversa-Akrostika poeziaĵo! *(vd apude; originalon sube.)*

Post tio, Hu Guozhu simpatie surprizis la atentan aŭskultantaron per klarigo de palindromo. Kio estas palindromo? Palindromo estas verso, kiun oni povas legi de maldekstro al dekstro kaj inverse, havanta fine la saman signifon. Jen liaj ekzemploj:
"Saĝa nomo naĝas"; "O, brua urbo!"; "Ora trovo: Vortaro!"; "Amis korpo proksima".
Facile, ĉu ne? Nu, provu ankaŭ vi: mi atendas viajn kontribuojn! Atentu, ke frazo havu ian kiel eble plej sencan signifon. Je ĉi punkto, se vi tiel lertas, eblas iom pli amuziĝi, per kreado de diversformaj palindromoj, ĉu rondaj ĉu kvadrataj ĉu aliformaj, laŭ via kapricemo.

Jen la ronda! De kie ajn oni eklegas, riceveblas sama frazsignifo, sed kun apartaj senteblaj nuancoj.




Kaj fine "Kvadrata Poemo", konsistanta tie ĉi el 7 vortoj, kiun oni legas de dekstre al maldekstre aŭ inverse, tiel ke eblas ricevi du diversajn signifojn:

En
Tiu ĉi
Triangul'
Aperendus
Sama poemet'
Hane kaj belete
En ĉina ideogram'
Sed, ho ve! ne regas mi
Ĉi ĉarman lingvon orientan
Miaj karaj, kontentiĝu je la
Esperanta kaj min pardonu
Se lamas la versaĵo, se
Ĝi senas je akrostik'
Ĉefe vi, ho mia
Majstro Hu, kiu
Daŭre-daŭre
Loĝnestos
En la
Kor'

Per
La flug'
Espera
Ni veturas
Al urbo Wuhan
Nia konferenco
Spertas lokon prefera
Unuafoje pri temo
Kun allogo de Ĉina Saĝo
Certe babilo kun ĝuo klera
Etoso senĝena libera
Saĝo Pegazon inspiras
Ofte vervon akiras
Nia verdfervoro
Amika restas
La memoro
Intime
En la
Kor'

A) Bildo stranga interese aprecita en mirinda poemo; aŭ
B) Poemo mirinda en aprecita interese stranga bildo.



Mi ne scias, ĉu mi sukcesis doni al vi ian ideon, ne banalan, pri la granda valoro de prelego de la famkonata kaj ege talenta ĉina verkisto kaj tradukisto Hu Guozhu. Se ne, mi invitas vin serĉi enrete la beletran revueton "Penseo" en kiu troviĝas multegaj liaj verkoj, per kiuj vi tiom pli lin aprezos.

Antaŭ ol fini, mi ŝatas al vi prezenti belan poemon de s-ro Hosemo, dediĉe al Guozhu.


用 Per
希望 La flug'
的飞翔 Espera
我们大家 Ni veturas
来到了武昌 Al urbo Wuhan
我们的学术会 Nia konferenco
体验汉族了地方 Spertas lokon prefera
这一次讨论的话题 Unuafoje pri temo
是关于中国智慧之光 Kun allogo de Cina Saĝo
内容有趣自然不难想像 Certe babilo kun ĝuo klera
气氛无拘无碍在会场 Etoso senĝena libera
交谈会给人以灵感 Saĝo Pegazon inspiras
诗兴也不时飞扬 Ofte vervon akiras
世界语者友谊 Nia verdfervoro
有如常青树 amika restas
情深义长 la memoro
在心中 Intime
永难 En la
忘 Kor'


Foto de la Pagoda-Inversa-Akrostika Poemo

Temas pri versaro, laŭ ĉinesko *Shuidiaogetou** kiu tre bone priskribas la mirindajn ecojn de ĉi elstara ĉina esperantisto.

Aŭtuno venas,
Blovas zefiro.
Kiam luno plenas,
Restas suspiro.
Vi kiel fakiro
Senlace ja penas
Kun la aspiro.
Ĉineskon tenas
Vi pioniro.

Al Viro
Mi benas
Per liro.
Vin ĉagrenas
Vi por bela inspiro.
Kiu vin komprenas?
Ho, via rapiro,
Bela satiro!
Mi sole splenas,
Pro la sopiro.

**(Shuidiaogetou*: ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun versoj de 55, 65, 665, 55/333, 47, 66-5, 55 silaboj laŭ rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa/xxa, xa, xxa, xa (*x=senrima*)



La floroj de Malbono, Ĉ. Baudelaire, kies portreto estis desegnita de Hu Guozhu

Laste trovitaj!

La celo de helplingvo estas ne nur favori la korespondadajn rilatojn inter malsamlingvanoj, aŭ pliriĉigi la kolektojn de filatelistoj, aŭ propagandi siajn ideojn/idealojn, estas ĉefe servi la parolantojn en ĉiuj kampoj de homa aktivado, el kiuj ankaŭ en tiu komerca. Jam en la komencaj jaroj oni provis disvastigi la lingvon en la komerca mondo, precipe per reklamado en Esperantaj gazetoj kaj per prospektoj, prezentantaj varojn kiuj povus interesi ĉiujn homojn. Pri la lingvo montris sian interesiĝon ankaŭ komercaj ĉambroj kaj, okaze de internaciaj konferencoj, oni donis gravan atenton al la eblo uzadi Esperanton por rilatoj inter komercistoj kaj landaj komercaj ĉambroj. Malgraŭ eldonoj de broŝuroj, propagandiloj, kaj rekono de utileco de komuna lingvo, tamen la afero ne sukcesis kiel oni atendis. Sed unuopaj esperantistoj-komercistoj klopodis per propraj rimedoj praktike sin konigi kaj akiri kontaktojn kun samfakaj komercistoj/ laboristoj. Ĉi-sube propaganda karto eldonita de s-ro L. Richard, UEA-delegito el Chalon sur Saone, kiu fondis la Internacian Asocion de Felistoj, "societo kies celo estas plibonigi kaj plifaciligi la rilatojn inter ĉiuj felaj mastroj kaj felaj laboristoj" kaj kiu estis unu el la komitatanoj (en 1911) de la urba asocio "Verda Stelo".



En komencaj jaroj de la pasinta jarcento, krom eldonado de varb-kartoj, plejparte admirindaj pro la artisma aspekto, kaj glumarkoj, kiuj abunde ornamis ĉiujn korespondaĵojn, oni produktis ankaŭ medalojn, juvelojn, horloĝojn k.s., ankaŭ por kontentigi la dezirojn de fervoraj esperantistoj kiuj emis ĉiel ajn videbligi la Esperantan simbolon, nome la verdan stelon. Kaj tiujn produktaĵojn oni klopodis kiel eble plej vaste reklami, ekz. per anoncoj en Esperanta gazetaro, aŭ en jar- kaj kongres-libroj, aŭ per aliaj tiam disponeblaj rimedoj *(ja, en tiuj tempoj ankoraŭ ne ekzistis interreto!)*. Jen tre interesa karto, ne nur pro la bela bildo de la 'arta esperantista signeto', sed ankaŭ pro la surskribitaĵoj, donantaj la ŝancon al ni, la posteularo, konatiĝi kun ne tiom mondfamaj esperantistoj, kiuj tamen, per sia konstanta, vigla kaj entuziasma agado, starigis firman bazon sur kiu sin apogis, por plua konstruado, la sekvaj generacioj de samideanaro.



Temas pri karto sendita en 1910, de F. Maetz el Amiens al Th. Liébard. Sur ĝi aperas reklamo pri bela medalo, plivaloregita per la vortoj de nia Majstro:

Ekflugis ideo trans montoj kaj maroj
Kaj lumo ekbrilis en densaj arbaroj;
Forflugas la vorto, rapide tagiĝas
Homar' fratigita en mondo naskiĝas.

Fakte sur ĝi estas gravuritaj maro, montoj, lumturo kaj 'Esperanto', kies literoj ŝajnas kvazaŭ radioj de leviĝanta suno. Supre staras verdemajlita stelo. La medalo aĉeteblis bronz-arĝenta, tutarĝenta, arĝenta kun orumita rando, 18-karate ora; kompreneble la kostoj estis malsamaj, laŭ la uzita metalo. Eldonis ĝin R. Enault el Parizo. Laŭ informoj de Jean Amouroux, ĉi artaĵo gajnis arĝentan medalon je la franc-brita ekspozicio en Londono (1908).

Kaj nun eta prezento de la sendinta kaj adresita korespondantoj.

La sendinto estis F. Maetz el Amiens (la urbo de Jules Verne), kiu ofte prilaboris esperantigon de muzikaĵoj. La adresito estis Th. Liébard, redaktoro de 'Normanda Stelo', monata organo de la *Fédération Espérantiste Normande*, eldonita de la Grupo en Rouen, en kies numero de julio 1910 aperis la 'Esperantaj stancoj al Manjo', kun permeso de la aŭtoro, akirita de li mem por s-ro Maetz. Interalie en tiu poŝtkarto, Maetz eldiras sian bedaŭron pro neeblo ĉeesti la prelegon de Boirac (*alia grava franca agemulo: pri li aperis informo en Tea-Bulteno maja-junia*), okazonta ĉe la urbodomo de Rouen la 30^{an} de aprilo 1910.

Kaj por fini, jen du strofoj el la muzikaĵo tradukita esperanten de la brava Maetz:

Manjo, jen printempa sun'
Ĉion revivigas nun,
Ĉion superregas amo...
Kaj la birdon en la nest',
Por ke gaja estu l' fest'
Vekas ĝia dia flamo.

Superregan ĉarmon mi
Ankaŭ sentas apud vi...
Manjo, la okuloj viaj
Tiom al si tiras min
Ke ne plu fortiri sin
Povas la okuloj miaj. ...

Dankon al Amouroux, kiu tre afable havigis al mi informojn pri tiuj ĉi valoraj esperantistoj: certe sen lia helpo miaj artikoletoj "Laste trovitaj" ne estus tiom interesaj! Ĉu vi konsentas pri tio?

Esperanto Lodge en Senegalo





Krom privata plaĝo el neĝe blanka sablo, la strukturo ESPERANTO LODGE metas je dispono piknikan areon kaj plurlingvan servistaron. Eblas uzi retaliron, kontraŭpage de indikota monsumo. Ĉiumatene la gastoj ricevas senpagan matenmanĝon. La transport-servo de tiu ĉi hotelo je 2,5 steloj inkluzivas veturadon al flughaveno (kontraŭpage kaj laŭpete). Parkado por gastoj estas senpaga. La servistaro povas zorgi pri lavado de vestaĵoj. Estas je dispono parklokoj kaj aŭtomobiloj aŭ limuzinoj. Tiu ĉi strukturo alireblas nur al nefumantoj (la malobservantoj estos severe monpunitaj!) Kie tiu ĉi interesa turismejo? Jen la adreso: Plage de Kafountine - BP 9 Diouloulou, Kafountine, Senegal. Mi atendas raportojn pri tiea restado!

El Esperantujo

Helpo al Esperanto-Bibliotekoj

Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen helpas denove Esperanto-bibliotekojn por pliriĉigi siajn kolektojn. Tiu fondaĵo de UEA subtenos ĉi-jare jam por la 15-a fojo bibliotekojn, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Lastjare naŭ bibliotekoj ricevis librojn je la valoro de 100 ĝis 200 eŭroj.

Por peti subvencion, oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de deziratajn libroj. Diskoj k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro papere (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam) aŭ rete al direktoro@co.uea.org.

Kun la vivo kaj agado de la dana Esperanta poeto Poul Thorsen (1915-2006), kiu kun sia edzino donacis la bazan bonhavon de la fondaĵo, eblas konatiĝi per la retejo www.poulthorsen.dk.

Internacia Esperanta Literatura Konkurso "Hristo Gorov-Hrima"

Hristo Gorov-Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Li verkis plurajn librojn, kiuj respegulas la pozitivajn homajn trajtojn: la solidarecon, la batalon por la bono, la strebon por honesta vivo.
Bulgara Esperanto-Asocio anoncas ĉi tiun Konkurson, okazontan ĉiun trian jaron, en kiu rajtas partopreni verkistoj, poetoj, ĵurnalistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso havas la jenajn branĉojn:
poezio - prozo - artikolo

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per du poemoj, originale verkitaj en Esperanto. La noveloj devas estis ĝis 4-paĝaj kaj oni rajtas partopreni per unu novelo, originale verkita en Esperanto. La poemoj, noveloj kaj artikoloj devas esti komputile kompostitaj. La konkurso ne havas apartan temon. La artikoloj estu dediĉitaj al signifa Esperanta aranĝo. La gajnontoj ricevos premiojn. La rezultoj estos anoncitaj en oktobro 2012.
Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 1-a de septembro 2012 al la retpoŝta adreso: modest@abv.bg aŭ per tradicia poŝto al la jena adreso: Georgi Mihalkov, "Nadeĵda" V, bl. 529, vh. A, et. 9, ap. 61 - Sofio - BG-1223 Bulgario

Ĉu vi jam legis, ke dum la 96a UK Kopenhaga ...

★... oni transdonis la kongresan flagon al la prezidanto de LKK de la 97-a UK, s-ro Nguyen Van Loi, kiu kore bonvenigis la kongresanojn post unu jaro al Hanojo?
★... estis decidite, ke la 98-a UK en 2013 okazos en Rejkjaviko, 36 jarojn post la antaŭa UK en la islanda ĉefurbo?
★... ricevis la ĉi-jaran *Premio Degučí* HORI Jasuo el Japanio pro multjara agado por konigi la japanan kulturon tra la mondo per prelegvojaĝoj, artikoloj kaj libroj, inter kiuj elstaras lia almanako *Raportoj el Japanio*, aperinta jam en 14 volumoj ekde 1997?
★... la Komitato de UEA elektis tri elstarajn movadanojn kiel Honorajn Membrojn de UEA? Temas pri: d-ro Detlev Blanke el Germanio, d-ro Renato Corsetti el Italio kaj s-ro Rob Moerbeek el Nederlando.

Grava evento en Kubo
Memorinda datreveno de KEA: 32 jarojn da Agado

Post kiam oni streĉe kaj digne laboris por sukcesigi la UK-on en Kubo, la loka esperantistaro ne haltis sian viglan agadon kaj partoprenis en Internacia Librofoiro: tio signifis kroman paŝon por omaĝi la 32 jarojn de KEA, dum kiuj ĝi firme kaj fruktodone laboris.



Kompreneble ke ne ĉiam ĉio estis bona dum tiu laborado, ĉar vivo estas tia, sed senhalte esperantistaro el Kubo batalis por antaŭenirigi komencitajn laborojn kaj por venki la obstaklojn kiuj bremsas kaj malhelpas sukcesan aktivadon.

Multaj geamikoj tra la mondo multon helpis nin anime, materie kaj per sia ĉeesto ne nur dum la du okazintaj Universalaj Kongresoj - julie 1990 kaj julie 2010 - sed ankaŭ per sia partopreno en eventoj kiel niaj Naciaj Kongresoj kaj sciencaj aranĝoj organizitaj de KEA-estraro.

Inter landoj neforgeseblaj kaj neforgesendaj troviĝas Belgio, Pollando, Germanio kaj, ne lasta ĉar malpli grava, sed ankaŭ Italio kaj, verdire, Triesto ĉar el tiu lando ni ĉefe renkontiĝis kun triestanoj.

Dum teruraj ekonomiaj problemoj, en Kubo, nia asocio ricevis multege da helpo por la asocianoj, ĉefe flanke de Eddy Raaths el Belgujo: lia grupo sendis diversajn donacojn por subteni en la klopodo solvi ekonomiajn suferojn flanke de kubaj esperantistoj.

Memoraĵojn pri ĉio ĉi ni konservas en niaj kapoj sed multe pli en niaj koroj, en kiuj, skulptitaj kiel sur ŝtono, estas ĉiuj bonaĵoj ricevitaj, kiuj tie restos porĉiame.

Nun, okaze de la 32ª datreveno de KEA-naskiĝo, ni festis akompane de muzikgrupo konsistanta ankaŭ el kelkaj esperantistoj, kiuj strebe pretigis sin por sukcesigi la kulturan aranĝon.

Ĉio komenciĝis per malfermo de foto-ekzpozicio, kion sekvis muziko, teatraĵoj, kantado kaj eĉ gustumado de diversaj frandaĵoj, kuiritaj kaj pretigitaj surloke de ni mem, por fini per vigla dancado ĝis preskaŭ frumatene. Ne mankis "rumado" kaj trinkado de vino aŭ suko laŭplaĉe. Plej pozitiva konsekvenco de tiu aranĝo ĉefe estis, ke je la fino ĉiuj eksentis ree ŝargitaj siajn 'bateriojn', kio signifas ke nia KEA havas brilan estontecon, kaj certe plue vivos dum multaj pliaj 32 jaroj, plena je sano kaj espero por sukcesigi la idearon de Esperanto.

Koran dankon al esperantistoj tra la mondo kiu helpis nin atingi digne tiu novan datrevenon.

Raportis Manuel Rodriguez Rabago (Havano)

Unuagradaj kursoj de esperanto en TEA
startos mardon la 4an de oktobro je la 20h00. Dum kunveno kun lernemuloj oni prezentos la lingvon kaj akceptos enskribiĝojn.
Ĉiuj estas petataj amplekse kaj vaste diskonigi ĉi anoncon! Koran dankon!

Septembra Programo

02 vendredo	20h00 - Bonvenon al vi ĉiuj! Agad-planoj: aranĝoj kaj kursoj en Triesto
06 mardo	17.30 - Posttagmeza renkontiĝo*
09 vendredo	14h30 - Esperanto ĉe Alirprogramo Radio Uno 20h00 - Literatura mondo
13 mardo	17h30 - Posttagmeza renkontiĝo
16 vendredo	20h00 - Konversacia Rondo
20 mardo	17h30 - Posttagmeza renkontiĝo
23 vendredo	09h00 - Kune kun COPED Cammina Trieste 20h00 - El Esperanta Gazetaro
27 mardo	17h30 - Posttagmeza renkontiĝo
30 vendredo	20h00 - Fotoj pri Ĉinio 2011

Oktobra Programo

04 mardo	20h00 - Starto de unuagrada kurso: prezento de la lingvo kaj enskribiĝoj
07 vendredo	20h00 - Ankoraŭfoje en Ĉinio!
11 mardo	17h30 - Esperanto-krucvortoj
14 vendredo	20h00 - Prelego pri Hans Jakob, svisa esperantisto, ekde 1920 UEA-direktoro
18 mardo	17h30 - Posttagmeza renkontiĝo
21 vendredo	20h00 - Bildoj el la mondo kun Anita
25 mardo	17h30 - Posttagmeza renkontiĝo
28 vendredo	20h00 - Fotoj pri Ĉinio 2011

***Ree ekas la renkontiĝoj ĉiumarde, ekde la 17.30 horo**. Proponu mem la temojn kaj/aŭ viajn dezirojn: ĉu gramatikajn, ĉu literaturajn, ĉu tradukajn ktp. Celo de la renkontiĝoj estas igi pli flua nian Esperantan elparoladon, konatiĝi kun literaturo kaj movado, pliampleksigi personan vortaron, pliprofundigi prigramatikajn sciojn. Mi atendas Vin!

Kune kun Coped CamminaTrieste

Piede de *Ferdinandeo* al Placo *Unità d'Italia*, tra la urba Parko *Farneto*, la ununura parko en Italio kiu de malcentra parto urba iras al urbocentro.
Vendredon la 23an de septembro, je la 9a horo, rendevuo ĉe *Ferdinandeo*.
Okazos ankaŭ renkontiĝo kun urbestro Roberto Cosolini pri problemoj de publika loka transporto kaj aŭtobusaj kunligoj.

ELF-AREK havas sian retpaĝon

Ekde nun funkcias retpaĝo de Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj, kiun vi povas rigardi ĉe http://elf-arek.wz.cz
Tie troveblas konciza historio de la ligo, ligiloj al ĝiaj funkciuloj k. aliaj interesaj retpaĝoj. En Prago, de la 8a ĝis la 12a de septembro, okazos renkontiĝo de Elf-Arek-anoj, kunorganizita de Kava-Pech kaj Elf-Arek.

SOLVO DE LA LUDOJ APERINTAJ EN JULIA-AŬGUSTA TEA-BULTENO

Divenludo SOPIROJ: la cigaredstumpo; STRANGA AFERO: la alumeto.
Cerbotiklilo: La "enŝteliĝinta" multipliko estas tiu markita per litero a). Ĝi estas la ununura kies produto ne entenas la ciferojn 4 kaj 5. Fakte:

a) 35 x 22 = 770
b) 45 x 12 = 540
c) 66 x 9 = 594
d) 73 x 8 = 584
e) 24 x 19 = 456



Jen kion proponas ĉifoje nia Viglo! Temas pri nova ludo, inspirita de lia profunda studado de la Zamenhofa Proverbaro.

REĜ-PAŜO 1

Per movo de unu paŝo, kiel la reĝo sur ŝaktabulo, tuŝu nur unufoje ĉiujn ĉelojn: eblos tiamaniere legi Zamenhofan proverbon. Startu de la flavigita ĉelo.

IT	**AS**	**RO.**	**A**
IR	**PL**	**VIR**	**P**
OLĈ	**O,**	**A**	**IN**
EV	**AL**	**HAR**	**A**

Klopodu solvi ĝin! Ĝi estas facilega, tial nur 'etan' premion ni havigos, al kiu sendos korektan respondon!

SENSACIA NOVAĴO!

Informis Leo de Cooman (Belgio)
kaj Ludoviko Molnár (Hungario)

Esperanto en la tradukmaŝinoj de la Eŭropa Komisiono! Ni ekuzis la traduksistemon lanĉitan kadre de tiu Komisiono ĉe http://itranslate4.eu, (tio angle prononciĝas kiel "I translate for EU" [Mi tradukas por Eŭropa Unio]).
La sistemo celas aŭtomatan tradukadon inter ĉiuj EU-aj lingvoj. Sed mirinda fakto estas, ke Esperanto estas inter la elekteblaj lingvoj, kvankam ĝi nenie estas menciata en la tekstoj.
La sistemo estas/os senpage uzebla. Laŭ nia kompreno, oni petas la uzantojn informi pri la kvalito de la tradukaĵoj liveritaj de la diversaj, apartaj kunlaborantaj tradukemaj personoj. Eblas ankaŭ proponi propran tradukon. Ni jam plurfoje faris tion.
Ni kredas, ke gravas por Esperanto uzi tiun sistemon kaj laŭ eble plej multe indiki sian preferon klakante sur steleton apud la plej taŭga tradukaĵo.
Ni esperas, ke multaj Esperantistoj kunlaboros proponante pli precizan Esperantan kaj nacilingvan tekstojn. Tiele ni montru al la EU-aj instancoj, ke Esperanto estas uzata en la Unio. Samtempe, tiamaniere, ni kuraĝigos kaj subtenos la homojn, kiuj programis la tradukadon el kaj al Esperanto. *(N.d.r.: mi provis: funkciaaas!!!)*

Fontoj de kelkaj artikoloj:
"Nova Sento" (nsir@lernado.it);
Gazetaraj Komunikoj de UEA; Ret-Info; NSIR.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it
Grupa ttt-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349